

Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44300 NANTES, Francujo

JARABONO

Jarabono : 70 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44300 Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61 L


(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1989 - 3


(JULIO - AŬGUSTO - SEPTEMBRO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... batalo sur la rivero Layon (1793)



... kaj Bavario, hejmlando por romantikuloj.

KULTURAJ KAJEROJ

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jeannine Vincent B.P. 54
49150-Baugé

Komitatanoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

ENHAVO

	paĝo
El Gresillon	1
Esperanto tra la Mondo (Frangeul)	2
La Barier-Ponto	3
Bavarujo (S. Boniol) II	4-6
Evaluo de la skribo (G. Roux)	7-8
Morto de cigan-reĝino	9-10
Paĝo de la geknaboj (Audrey)	11
Ĉu vi scias ? (R. Gonin)	12
La kokinoj (J. Renard)	13
Por via distro	14
La Vivo en Gresillon	15-16

El Grésillon

Finiĝis la 38-a somera sezono de la Esperanto-Domo. Gi estis agrabla ne nur pro la ege bela vetero. La nombro da ĉeestantoj estis pli granda ol la antaŭan jaron. Kursoj kaj prelegoj ŝajne plaĉis. Sed ne pri tio ni parolos.

En la kastelo ekzistas skatoleto en kiun la ĉestantoj povas enmeti siajn pendojn kaj sugestojn. Plendoj estas ege malmultaj (pro la komprenem de la ĉeestantoj?), kaj plej ofte temas pri tute ne gravaj okazaĵoj. Sugestoj estas pli oftaj kaj pri ili estas oportune paroli. Ni responda malrekte ĉar ili estas plej ofte anonimaj.

Koncerne la mankon de speciala telefon-punkto por la ĉeestantoj, la problemo ne estas simpla, kaj de longe ni studas ĝin. Oni ĝenerale pensas pri telefono por la eventualaj alvokoj de la kastelo. Sed tio alportas nur duonon de la solvo. Kion fari pri la alvokoj al la kastelo? Sur dua linio kun alia numero? Kiu avertos la vokitajn homojn? Koncerne la alvokojn de Gresillon al eksteraj lokoj necesos uzi mon-aparaton. Tia aparato estas multe kosta. Ankaŭ la plia abono kostas multe. Kaj tiu sistemo funkcios nur 3 monatojn en la jaro. Ni faris kalkulojn helpe de telefon-teknikisto. Ne eblas reenspezi la plian elspezon. Pro tio ni akceptas sistemon, kiu ĝenas la telefonantojn kaj ni mem.

Alia sugesto: kelkaj ŝatus vespermanĝi pli frue (la norduloj), aliaj pli malfrue (la suduloj). Tio pruvas, ke kelkaj homoj, eĉ en internacia etoso, volonte trudus siajn kutimojn al la aliaj.

Nia programo por 1990-

10/21-04: Praktika formado de instruantoj samtempe: Infanrenkonto.
15-06/02-07: Internacia amika renkonto
02/16-07: Prelegoj kaj kursoj.
17/31-07: Lernu kaj praktiku (I)
01/15-08: Lernu kaj praktiku (II)
16/31-08: Somera lernejo.

Esperanto tra la Mondo

POST LA UNIVERSALA KONGRESO EN BRIGHTON- Pli ol 2 200 gepartoprenantoj estis enskribitaj por la 74-a universala kongreso, kiu okazis en Brighton (Anglio), de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto. La alta protektanto estis Lordo Wilson, eksa ĉefministro.

Kiel nova prezidanto de UEA, anstataŭ Prof. Humphrey Tonkin, estis elektita Dr. John C. Wells, profesoro pri fonetiko en la universitato de Londono, aŭtoro de pluraj libroj, el kiuj la konata "Lingvistikaj aspektoj de Esperanto." Aliflanke, krom S-ro Gregoire Maertens, la tuta estraro de UEA estis sanĝita.

Kiel kutime oni prezentis buntan programon: tri teatraĵojn:"Kato sur varma ladotegmento", de Tennessee Williams, ludita de la germana trupo "Kia Koincido", "Kiel amas la aliuloj" de Alan Ayckbourn, ludita de angla trupo, kaj "La eta princo".

La lanĉo de la kongreso okazis en Londono, en la impona Guildhall, kie Zamenhof parolis dum la 3-a kongreso, en 1907.

En 1990 la kongreso okazos en Havano (Kubo) de la 14-a ĝis la 21-a de julio.

INTERNACIA JUNULARA KONGRESO- Por tiu 45-a IJK, pli ol 500 gejunuloj kunvenis en Kerkrade (Nederlando) de la 16-a ĝis la 23-a de julio. La temo de tiu kongreso estis "transporto"; la prezidanto de TEJO por la periodo 89-91 estas Jan Koszmaluk. La venontjara kongreso okazos ankaŭ en Kubo.

INTERNACIA EKSPOZICIO DISPONEBLA- UEA realigis internacian ekspozician materialon sub du formoj: 35 koloraj paneloj 60x85 cm. por prunto, kaj 36 lumbildoj por vendo.

KULTURA ESPERANTO-FESTIVALO EN PARIZO- La 18-19ajn de novembro 89 okazos festivalo de teatro kaj kanzono en Parizo (M.J.C. de Issy-les-Moulineaux). En la programo: kanzonoj de Le Puil kaj Jerzy Handzlik, "Kunveno de birdoj" prezentota de Studenta Esperanto-Teatro de Zagreb; varietea spektaklo kun la nederlanda grupo "Kajto", kabaredo kaj kantoj kun Junulara Esperantista Franca Organizo kaj Roman Bura, literatura forumo:"La nuntempa literaturo",ktp. Informilon ĉe UFE, 4bis rue de la Cerisaie, 75004 Paris.

INTERNACIA SEMINARIO DE GEJ- La tradicia Internacia Seminario de Germana Esperantista Junularo kaj Internacia festivalo, okazos de la 27-a de decembro ĝis la 3-a de januaro, en Neumünster, 60 km. de Hamburgo. Temo de la Seminario:" Sovetunio", kun antaŭvidata partopreno de junaj sovetianoj. Por la seminario: Germana Esperanto-Junularo, Rheinweg 15, D-5300 Bonnl, F.R.G. Por la Festivalo: H.D. Platz, Maikammererstr. 21, D-6731 S. Martin.

POR LA RADIOAMATOROJ- ILERA estas la nomo de la internacia asocio de la esperantistaj radioamatoroj. La sekretario estas S-ro Matusinka Laslo, Gyözelem u. 2, H-2730 Albertirsa.

La aktiva franca sekcio (GEPRAF), havas nun sian sidejon en la kulturdomo Gresillon. Rilatu kun la franca sekretario S-ro H. Chaisnot, 17, Le Pré-Madame, 49000 St-Lambert-la-Potherie aŭ kun la prezidanto S-ro L. Venon, 10 rue Robert Leroy, 41140 Selles-sur-Cher.

KOMERCA PLURLINGVA TERMINARO- Internacia Komerca kaj Ekonomia fakgrupo ĵus publikigis seslingvan Komercan terminaron, kiu estos utila pro la bedaŭrinda elĉerpiĝo de la bone konata Internacia komerca-ekonomika vortaro en 9 lingvoj. Kontakti:S-ron R. Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge ; franca peranto: S-ro F.X. Gilbert, Vert-Coteau,55000 Longeville-en-Barrois.

La barier-ponto

Dum ekskurso en la regiono Anĵu oni multe parolis pri la bataloj inter la respublikaj armeoj kaj la ribeliĝintaj "vendeanoj" en 1793. Inter alia estis priparolita la "bataille du Pont-Barré" (la batalo ĉe la Barier-Ponto).

En tiu epoko la parto de Francio, kiu ribelis kontraŭ la respubliko etendiĝis de la suda bordo de Loire ĝis la Oceano. Kiam oni deziras iri de la riverego, oriente de Angers, ĝis la Oceano, la unua natura baro por la armeoj estis la rivero Layon, (nun konata ĉefe pro sia ege bona dolĉa blanka vino!) Tial okazis batalo en loko, kie estis ponto sur tiu rivero. Ĉar por transpasi la ponton la homoj devis pagi sumon, ekzistis bariero sur la ponto, kiu pro tio ricevis la nomon Barier-Ponto.

La ribelo naskiĝis en marto 1789. Komence ĝi brile sukcesis dank'al la okupado de la regionoj ĉirkaŭ la urboj Thouars, Saumur kaj Angers. Sed post malsukceso antaŭ la urbo Nantes la 29-an de junio, la granda katolika, rojalista armeo retroiris sud-okcidenten al Vendée por la rikolt-sezono. La volontuloj estis plejparte kamparanoj. La pariza registaro profitis la okazon por sendi al tiu ribelanta regiono novajn armeojn.

La 26-an de julio parizaj volontuloj, kies nombro estis 600 estis surprizitaj de 12 000 vendeanoj, en danĝera situacio sur krutaĵo super la rivero Louet. Ili estis devigataj salti de la supro de la klifo kaj preskaŭ ĉiuj mortis. Memore al tiu okazaĵo monumento. estis konstruita en 1889 en loko nomata "La roche de Mûrs" ĉar Mûrs estas apuda vilaĝo.

En septembro alvenis novaj armeoj kaj la respublikaj generaloj projektis kapti la tutan regionon per giganta pinĉilo el du armeoj. La orienta parto de tiu pinĉilo venis de la Loire ĝis la Barier-Ponto. La 17-an de septembro 60000 respublikaj soldatoj transpasis la Loire, Inter kiuj 15 000, komanditaj de generalo Duhoux, renkontis 3 000 vendeanojn, venkis kaj transpasis la ponton. La 18-an de septembro la respublikanoj pluiris okcidenten bruligante, rabante kaj mortigante 80 homojn. Sed la saman tagon venis aliaj vendeanoj komanditaj de la Kavaliro Duhoux, nevo de respublika generalo, kaj tiam la respublikanoj estis devigataj retropasi la ponton kaj instaliĝi sur la supraĵoj, norde de la rivero.

Dum la nokto, vendeanoj transpasis la riveron per aliaj pontoj, almontaj kaj alvalaj, nekonataj de la respublikanoj. Matene de la 19-a de septembro, la vendeanoj atakis la respublikanojn fronte kaj ankaŭ deflanke. La batalo furiozis sed, ĉirkaŭataj, la respublikanoj ne plene sukcesis forkuri. 1362 el ili estis mortigitaj laŭ la nombrado je la momento de la enterigo.

En "La roche de Mûrs" monumento estis starigita memore al la viktimoj. Ĉe la Barier-Ponto la viktimoj estis anonime kaj amase enterigitaj en iu loko nomita "Fosse Cadeau" (fosaĵo de Kado); oni starigis monumenton je la gloro de la venkintaj vendeanoj.

La Barier-Ponto estis rekonstruita sed, forlasita, ĝi iom post iom ruiniĝis.



BAVARUJO (2)

HEJMLANDO POR ROMANTIKULOJ

Neflekseble senedzina. Stranga epizodo, tiu reĝa decido fianciĝi kun la kuzino Sofia-Karla von Wittelsbach, la pli juna fratino de Elizabeta el Aŭstrujo, la famkonata Sissi; ĉi lastan bone difinas la jena frazo de ŝi dirita: "Se oni min truddevigus ie restadi, eĉ en paradizo, ĝi iĝus por mi infero".

Inter Ludoviko kaj Sofia ne ekzistas la intima kompliceco, la kvazaŭa identeco, kiujn li kundividas kun Elizabeta. Sed inter la Wittelsbach nur Sofia povas kompreni Vagneron kaj lin ami. Muziko estas por ŝi "vasta fluo super la komuna sentmaniero". Ŝi rave kantas la vagnerajn melodiojn sub propra pian-akompanado en la Rezidejo. Ambaŭ legas la vagnerajn tekstojn, kiujn ili parkere konas; ili kunkantas kaj kundeklamas. Krome Sofia similas Elizabetan. El tio okazas duobla transŝovo (psikanalizisto dirus: la ina idealo de Ludoviko estas vagnera heroino (li konstante nomas Sofian Elsa), simila al Elizabeta. La frato Karlo-Teodoro (kun karesnomo Gracki), komisiita esplori la reĝajn intencojn, ricevas surprizan respondon "Admirinda amikino estas Sofia".

Eĉ antaŭ ol fianciĝi, Ludoviko sendas al Sofia leteron per tiuj pensigaj vortoj finiĝantan:"Ci estu feliĉa kaj memoru pri mi". Kaj en la sama letero legeblas:"Ci ja konas la naturon de mia vivdestino. Antaŭ nelonge mi skribis al ci el Berg pri mia misio en tiu ĉi mondo. Ci ja scias, ke ne multaj vivjaroj restas al mi, ke ĉi teron mi forlasos, kiam jam ne plu brilos mia stelo, kiam li jam ne plu estados, la Amiko fidinde amika. Jes ankaŭ mia vivo tiam estingiĝos, ĉar ekzisti mi jam ne plu povos."

Tamen ili gefianciĝas. Kial? Ĉar liaj adjutanto kaj ŝildisto geedziĝas."Nu, ekkrias Ludoviko, mi faros same por vin akompani." Li skribas al Sofia:" Gravas,ke ni sincere amu nin reciproke. El ĉiuj vivantaj virinoj, ci estas la plej por mi altvalora... Sed mia vivdiaĵo, kiel ci jam scias, estas Richard Wagner." Kaj la uzataj de ili subskriboj ne estas "Ludoviko" kaj "Sofia", sed "Henriko" kaj "Elsa".

Sofia loĝas en la apudlaga vilao karesvorte nomata Possi; Li, trans la lago, en Berg. Nokte li venas por amindumi kaj vekas la tutan familion...aŭ komisias sian adjutanton por la galantaĵoj...

Kiam estas konate, ke la geedziĝa festo prokrastiĝos, Sofia diras al la patrino:"Sed tamen, ĉu vi ja ne vidas, ke li ne amas min? Li spitas min." Fakte li aktoras anstataŭ vivi. Kiam oni demandas lin:" Kia estas via ina idealo?" li rebatas: "Animo bela, korpo bela, voĉo muzikoplena, ĉirkaŭŝvebanta lilia parfumo."

Post rezigno li skribas al Vagnero:"La felicĉo, kiun mi sentas depost mia liberiĝo de tiuj pezegaj katenoj kompareblas nur kun la ravaj voluptoj de resaniĝanto, kiu finfine enspiras iom da aero post danĝera malsano... Mi eliĝas el malĝoja sonĝo kaj nun la ena paco, kiu tiomlonge forfuĝis de mi, estas mian animon enpenetrinta."

Post la ligorompiteco la solemulon hantas la nokteca reĝolando, kie li forperdiĝos. Li rifuĝas en Hohenschwangau (vortvorte: alta lando de l 'cigno), kie li perceptas silenton "tiom instigan", kaj konstruemo lin ekkaptas. Ĉar grizaĉa kaj malamika montriĝas la mondo, brilaspektan kaj subliman mondon kreos li. Neuschwanstein (nova ŝtono de l'cigno) estas konceptaĵo nur lia, kun ofta tendenco al iel dubinda mistikismo.

Ni eksurvojiĝu.

Atingonte la mezepokstilan fortreson post vizito al la linderhofa juvelo, ni leviĝas de 500 metroj ĝis pli ol 900 laŭlonge de reviga vojo, foje tutsombra sub arbolaŭbegoj, foje inter krude verdaj herbejoj heliĝanta, dum oftaj kurbiĝoj malkaŝas la montokonturojn post ardezkolora

milda horizontlinio. Kiel trafe titoliĝas tiu "romantika valo"! Ni trairas vilaĝojn kaj urbetojn kun dometoj, ĉu blankaj, ĉu laŭ la jam priskribitaj koloroj kaj tegmentoformoj. Sur la fasado de kelkaj nin surprizas naive pentritaj scenoj, kiuj nin portas al la lando de feinoj: la Grimm-fabeloj aperas sub niaj okuloj; tie pintiĝas la oreloj de la lupaĉo apud naiva Ruĝa Ĉapeto; tie ĉi ni kapsalutas al Sankta Georgo meze de religia sceno rektiĝanta. Ni ne volas preterpasi la helajn preĝejetojn ne vizitante ilin. Ĉie oraĵoj briladas kaj rebriladas; ĉie riĉas la mur- kaj plafonlignaĵoj; abundas skulptaĵoj, reliefigitaj de lumodonaj larĝaj vitraloj. Ĉu tiel kvieta fantazioplena vivoloko ekzistas plue, ŝirmite de frenezigaj bruaĉoj kaj rapidemo?

Linderhof, pompe luksa ensorĉejo.

Meze de pritonditaj verdaĵoj elegante ĝi blankas. Notindas, ke ne mondfamajn artistojn la reĝo elektis, sed regionajn li preferis, rezervante por si mem la finajn decidojn.

En la vestiblo staras statuo de Ludoviko la XIV-a dum surplafone suno disradiadas. Ni ne forgesu, ke la Suno-Reĝo estis la baptopatro de Ludoviko la Unua, siavice avo kaj baptopatro de "nia" Ludoviko.

En la muziksalono nian rigardon tiras stranga malsobra muzikilo, duon-fortepiano duon-harmoniumo, por Vagnero destinita, kaj tamen neniam uzota. Ĉie orgarnaĵoj, inkrustaĵoj, skulptaĵoj...ĝis malsobreco. Lazurito plibeligas marmoron -aŭ imito- celan stukon. Ĉarmas la kabinetoj roz- kaj lilakkoloraj, flava, blua. Tiun amatan bluon ni retrovas en la dormoĉambro, kie milda por la okuloj veluro orfadene surbrodita kreas pacigan etoson. Baldakenan liton balustrado apartigas - ĉu remparon kontraŭ si mem volis starigi la reĝo?

Kaj jen la manĝoĉambro. Oni funkciigas la faman "manĝoservan" tablon, kiu desupras kuirejen kaj realsupras provizita per ĉio necesa por tutsola manĝonto.

En la glacosalono sparklas 16-branĉa lustro. Legendo rakontas, ke tie malsovaĝigita ĉamo kapriolis, erarigite de enspegulaj ŝajnaj salonoj, ĝis unu el la speguloj fraka-siĝis. Magia loko superŝutegita de orgarnaĵoj kaj ornamaĵoj ĉiuspecaj, kie fikcio kuntuŝiĝas kun realo, fikcio de romantika moŝto strebanta imitadi la klasikan francan kortegon; realo de amasigitaj multvalorajoj kune kun falsbrilaĵoj, kiuj kolerigis la bavaran popolon pro troa elpumpado de la ŝtata trezoro. Ja belo regas, sed ankaŭ troigo.

Neuschwanstein: la mezepoka sanktejo.

Ek al la mezepoka fortreso, la superstaranta gigantaĵo, atingota post kvaronhora piedgrimpado (por malgrimpi mi uzos ĉarmoplenan malnovan kaleŝon, kiu plilongigos la pasintjarcentan etoson). Ni estas veraj pilgrimantoj, retroirantaj la tempon. Kaj samkiel en preĝejo al difinita sanktulo dediĉita vidiĝas statuoj kaj artaĵoj al li rilatiĝantaj, ĉi tie disvolviĝas de ĉambro al ĉambro la tuta mezepoka legendaro, la neelĉerpebla inspirofonto por Vagnero. En la enir-halo, Siegfried; en la manĝoĉambro, scenoj de la XIII-a jarcento datumantaj, el kiuj originas la Majstroj-Kantistoj; en la dormoĉambro, pompaj pentraĵoj pri Tristano kaj Izolda; en la granda salono, Lohengrin. Sed ni revenu al la dormoĉambro por admiri la kurtenojn kaj mebloŝtofojn laŭ la ŝatata bluo. Litpiede aperas skulptaĵo de reveniĝanta Kristo; tiu simbola rilato inter dormo kaj morto konstante sieĝadis la reĝon. Kaj neatendita konstato tiklas mian menson: tiu fanatika amanto de mezepokaj tradicioj estas samtempe moderna teknikamanto, lerta spertulo, eĉ avangardema elpensanto. Pri tio svarmas pruvoj.

Fluantan akvon liveras en la tuta kastelo fonto 200 metrojn pli supre situanta. Mirigite ni rigardas la latunan cignoforman verŝilon super la tualet-pelveto. Se ni turnos la okulojn al la fenestroj mirindan vidaĵon ni ĝuos: akvofalo 45 metrojn alta, interkrutejo kun superelstaranta ponteto, kies

ununuran arkaĵon trairadis Maria el Prusujo por viziti la filon. Tial ĝi nomiĝas Marienbrucke, omaĝe al ŝi. Sur ĉiuj pordoj brilas latunaj seruroj; latunaj ankaŭ la kandelabroj, dum la murpargetoj estas el sentubera kverko-ligno.

Sed gapas ni pro miro en la teretaĝa kuirejego: jen tutaŭtomataj turnrostiloj por ĉasaĵoj kaj flugilaĵoj (la meĥanismon elpensis Leonardo de Vinĉi). Ĉie fluadas varma kaj malvarma akvo. La fumo de giganta forno eligata subgrunde foriĝas. Ĉi tie enmura pladlevilo estas hejtita de la kamentuba varmo. Kaj la hejtadon de la tuta kastelo oni ŝuldas al varma aero. Larĝa fiŝbaseno el granito staras ĉe la elirejo. Tamen malpli ol ses monatojn, eĉ ne sinsekvajn, la genia konstruinto tie loĝis... Estus grava manko lin elvoki preteratente lian kuzinon Elizabeta, unu el la tro malmultaj, kiuj kapablis porti al li iom da feliĉo dume de turmentataj vivjaroj.

Aglo kaj mevo. La solemulon ĉiam ĝojigas la kunesto de Sissi. Maltrafinte lin en la Insulo de l'Cignoj, tiu ĉi kelkvorte lin sciigas pri sia vizito: "Por ci, montara aglo, gasto de porĉiamaj neĝoj, jen penso de la mevo, reĝino de ŝaŭmantaj ondegoj." Du solecemaj birdoj: jen ili. La unua suprenkuras ĉe la bavaraj montopintoj, la dua transmariĝas kaj ironioplena krio ekmovigas ŝiajn flugilojn horizonten. Ŝiaj vizitoj revigligas Ludovikon, sed kapablas haltigi, nek lian megalomanion, nek lian persekutiĝan deliron.

Kiam Sissi dum la matenmanĝo estas sciigata de sia filino Gizela pri la morto de la amata kuzo, ŝi ekkrias: "La revoreĝon mortigis la registaro." Surplanke kuŝanta ŝi preĝas: "Jehovo, granda Ci estas, Dio de l'venĝo Ci estas, Dio de l'graco Ci estas, Dio de l'saĝo Ci estas." De la junaĝo korproksimaj, ambaŭ estis belaj kaj altkreskaj; ambaŭ fortiriĝis el la mondo: ŝi per dismigrado, li per konstrurevoj. Ambaŭ etiketon ironie preteratentis; ambaŭ suferadis, mokspitante la vivpezegon. La horoj travivitaj de ili en la padelŝipo "Tristano" estis altvaloraj momentoj, kiujn ili forrabis de siaj oficialaj truddevigoj.


Al la amata kuzino li sendigis centojn da rozoj, puran amon simbolantaj. Post lia morto Sissi, de li ofte titolata kolombo, ordonas, ke lian bruston oni kovru per jasmena branĉo. Tiun floron li amis kaj ĝi estis por ili rekonigilo.

Kvazaŭ eĥe al la ludovika sentmaniero ŝi skribas:" Malĝojo estas por mi pli kara ol vivo." Kaj forlasonte Bavarujon:" Adiaŭ, mia lago. Hodiaŭ mi ĵetas mian patrujon en la fundon de ciaj akvoj kaj mi senripoze revagadas tra la mondo, novajn horizontojn serĉante."

" Mi volus forlasi ĉi mondon, kiel forfluganta birdo." Kaj post la mistera morto de la filo Rudolfo: " Frakasitaj estas miaj flugiloj, nur al ripozo mi sopiregas."

Konkludo estus troa: restu nur revo kaj ravo.

S. BONIOL



El prelego prezentita en Gresillon

Evoluo de la skribo

De la unuaj skribaj signoj al nia skribmaniero kaj plej modernaj registradoj estis longa peniga vojo.

La signoj malkovritaj en grotoj al kiuj oni atribuis religian aŭ ritan valoron, estis, eble, nur esprimo de kreema plezuro de stilizitaj bildoj, sed eble ankaŭ estis rimedo de fundamenta esprimo de la homo per kiu efektiviĝas la projekcio de lia kompreno de la mondo, la aperigo de lia krea kapablo.

Kiu estas la senco de la arbitraj signoj sur la zonoj de la indianoj Iroquois faritaj per linioj de konkaĵoj aŭ perloj? Oni multe parolis pri la surskriboj memorhelpaj de la Pask-insulo, similaj al figuroj de fadenludoj, kiuj subparolas psalmokantadon por rememori genealogiojn aŭ sanktajn himnojn, surskriboj, kiuj unuavide similis al signoj de urboj apud la riverego Indus aŭ de Cejlono. Eĉ la manuskriptoj de la kopiistoj-monaĥoj ludas, kiel kolektiva memoro por inicitoj.

Skribo estas nur 6000jara. Unue estis rakontoj per bildoj. La mallongigita skribo de la antikva Egiptio, tiuj de Sankta Jeromo kaj Sankta Aŭgusteno taŭgis nur por pastroj kaj adeptoj. Oni kredis skribon de dia deveno, kaj oni atribuas al Moseo la hebrean skribon.

Je la XVIII-a jarcento antaŭ Kristo, oni elpensis alfabetojn multformajn ĉe tre nombraj landoj. La greka kaj la ĉina lingvoj estas la plej malnovaj; oni konas ilian evoluon de 1400 antaŭ Kristo ĝis nun t.e. proksimume 3390 jaroj kaj same la evoluon de la skribo.

La skribmaniero de la plej malnovaj grekaj dokumentoj havas nenion komunan kun la alfabeto ricevita de la Fenicoj je 750 jaroj antaŭ Kristo. Estis fonetika skribo sed iom ne preciza. La unuaj dokumentoj estas kalkuloj sur argilaj tabuloj malkovritaj en 1886 en Kreto kaj en 1939 en Pylos (suda Grekio). En 1952 oni malkovris la inventaron de potoj en reĝaj kuirejoj (1400 jarojn antaŭ Kristo).

La deĉifrado estis malfacila pro la evoluo de la lingvo, sed finfine oni kapablis traduki tre antikvajn tekstojn.

De tiu alfabeto devenas la cirila alfabeto uzata de rusoj kaj slavoj, kaj la latina alfabeto uzata en Okcidenta Eŭropo, grandparte en Afriko kaj Azio. Oni celebris la XI-an jarcentan datrevenon (863) de la cirila alfabeto en 1963. Konstanteno-Cirilo kaj Metodo estis fratoj el Tesaloniko, kiuj venis al Moravio por prediki evangelion per la lingvo de tiu lando. Cirilo elpensis literojn por skribi la slavan lingvon. Kiam ili mortis, iliaj disĉiploj forkuris Bulgarion kaj Makedonion. Fine de la X-a jarcento la kleraj Bulgaroj helenigis tiujn literojn, kiuj larĝe disvastiĝis en Serbion, Bosnion, Rusion en 998 kaj Rumanion ĝis la XIX-a jarcento.

La malnova ĉina skribo estis ideografia (nenia indiko de prononco). La unuaj dokumentoj estas demandoj al la dioj, gravuritaj sur ostoj, kiuj, deponitaj sur fajro, indikis la dian respondon laŭ la rompfendetoj de la kalcinitaj ostoj. Tiuj signoj evoluis iom post iom. Sed oni devas scii 3500 signojn por legi gazeton; 2 ĝis 30 strekoj estas necesaj por desegni unu signon. Senco kaj prononco estas malfacilaj. Similaj signoj povas enteni malsamajn sencojn; por kompreni ilin oni aldonas ideogramon, kiu aliĝas al la signo sed ne estas prononcita: estas ŝlosilo (vidu la ilustraĵon sur la posta paĝo). 3 (per aldono de 1 kaj 2) signifas morusarbo; 4 (per aldono



de 5 signifas gorĝo. Je la universitata nivelo 5 ĝis 6000 signoj estas necesaj; por la klasika literaturo 10 000.

La ideogramoj okazigas multe da malfacilaĵoj: por presado la tekstoj estas mane vicigitaj (7000 signoj); por la telegrafo: ĉiu signo bezonas kodon. Do, 2 tradukoj estas necesaj, ĉe la foriro kaj la alveno; granda malfacilaĵo por la gazetistoj inter aliaj. La vortaroj, indeksoj kaj referencoj estas nekontentigaj. Pro ĉio ĉi, la latina alfabeto, kiu estas la plej vaste utiligata, iom post iom anstataŭas la malnovajn ideogramojn. Sed alia malfacilaĵo: unuecigi la parolmanierojn de la ĉina lingvo kaj popularigi la komunan fonetikan lingvon, kun norma prononco de Pekino. Tamen studentoj estas devigataj lerni tradiciajn ideogramojn kiel ekzemple en Francio kaj Anglio oni studas grekan kaj latinan lingvojn.

Alia speco de skribo estas la malnovegiptaj hieroglifoj. Oni tuj pensas pri la ŝtono de Rosette kaj la fama Champolion, kiu sukcesis traduki tiun skribaĵon, komparante ĝin kun la apudaj en kutima skribo kaj en greka lingvo.

Kun la Egiptoj, Kretanoj kaj Ĉinoj la Mezopotamianoj efektivigis la unuan paŝon al la silaba skribo kaj dank'al evoluo de la desegno aperis kojnoforma skribo per pintigita kano sur mola argilo, antaŭ kuirado.


La apero de la strekaĵoj, kiuj fariĝis nia alfabeto, okazis en Fenicio kaj norda Sirio, eble 1300 jarojn antaŭ Kristo. Estis alfabeto de 22 literoj, konsonantoj. Dank'al semidaj vojaĝantoj la Grekoj konis tiun alfabeton kaj aldonis vokalojn.

De la skribo de norda Sirio devenas, inter aliaj, la etiopia, la kvadrata israelia, tiu de kelkaj popoloj persaj, turkaj, mongolaj, beduanaj de Arabio. Dank'al la disvolviĝo de islamismo, la araba skribo eniris internan kaj centran Azion, parton de Hindio kaj Afriko.

Dum la evangelizado, oni uzis grekan skribon en Afriko, norde de la Nigra Maro, por la ĝermana gotiko; post modifoj, en la slavaj landoj; ankaŭ en Italio, ĉe etruskaj kaj latinaj popoloj. Ĝi naskis la malnovajn ĝermanajn kaj skandinavajn alfabetojn.

Fakaj scienculoj studis malnovajn skribmanierojn de Sumero, Saharo, de la indianoj Majaj, kiun oni deĉifris dank'al elektronaj maŝinoj.. Sed ankoraŭ ne detradukitaj estas skribo sur argila disko de Kreto kaj sur ŝtonaj sigeloj en Penĝabo kaj Paskinsulo.

Germaine ROUX



Tute nova skribo de la kanadaj eskimoj. Signifo:
" Unua konferenco de la nord-polusaj kooperaj societoj."

Funebro ĉe la ciganoj

La 24an de aprilo 1958 mortis la reĝino de la ciganoj Mimi Rossetti, ĉirkaŭate de siaj laŭte plorantaj subuloj. Tio okazis en la itala urbeto Lendinara, en tendo, kiu estis ŝia proprajo. Krom tio ŝi posedis malnovan aŭton kaj kelkajn juvelojn. Oni publike bruligis ĉi tiujn posedaĵojn escepte de la juveloj, kiujn heredis ŝia sekvantino. La ceremonioj okaze de la morto de maljuna virino kun nekonata aĝo, reĝino de la plej vagema popolo de la mondo, montras al ni interesan folkloron, kiu de antikvaj tempoj karakterizas la ciganojn. La ceremonioj estas "strangaj" sed ili havas profundan sencon. D-ro E.M. Gajàry-Kuhinka, eksperto pri tiu folkloro, rakontas interesajn detalojn pri la entombigaj kutimoj de la ciganoj:

La morto, tiu granda mistero, pensigas la homojn. La regno de la mortintoj, kiom ajn nekomprenebla kaj malklara, tremigas la postvivantojn. La lastaj kantas siajn korŝirajn plendkantojn, kiujn ili dramece elkriadas en la rondo de la anoj de la gento. Pro la drinkado de multe da alkoholo iliaj muskoloj histerie rigidiĝas. Samtempe la gentanoj daŭre observas la doloron de la postrestinto. Ju pli pasia estas la plendkanto, despli granda estas la certeco, ke la mortinto en la transmondo trovos ripozon kaj ne ĝenos la vivantojn. El socia vidpunkto la postrestintoj devos do, kiel eble plej ekstaze, prezenti la kantojn. Kiam la patrino mortas, oni entombigas ŝin kun granda honoro kaj la postrestinto plendkantas apud la kadavro sub kontrolo de la gentanoj. Ĝuste pro tiu kontrolo la plendkantoj, kiel ajn bona estis la intenco, perdas iom el sia spontaneco. Sed neniu filo aŭ filino kontraŭstaras tiun leĝon. La tradiciaj kutimoj estas ĉiam tre severe respektataj. Kiel ajn estu, plendkantoj sonadas dum la nokto. Tiel la kanto fariĝas kunliganta ĉenero inter la ĉielo kaj la tero, ĉar pro la intensa travivaĵo estiĝas ponto inter la transcendo kaj la realeco. Tial la cigano tre facile povas havi kontakton kun la mortinto. Kaj ĉi tiu kontakto, kiel ajn nekredebla tio ŝajnas esti, estas spertata de tuta ciganà komuno, kiel io tute reala.

"Ho, patrino, kial vi forlasis min? Kial vi foriras nun? Vi lasas min sola kiel hundon sen mastro! Nun la vento disŝiros miajn vestojn... Neniu riparos ilin por mi! La blankaj homoj piedfrapos min kaj plu estas neniu, kiu prizorgos miajn vundojn... La vasta tero fariĝis mia loĝejo anstataŭ via sino, ho patrino!... Nun la ĉielo estas mia tegmento kaj ne plu via bona mano, kaj la malmola ŝtono fariĝis mia kuseno, sur kiu mi ploros dum tago kaj nokto! Ĉar mi ploros tiel longe, ĝis miaj larmoj ŝanĝiĝos en sablon! Mi ne plu povas manĝi! Mi ne plu povas trinki! mia nutraĵo fariĝis miaj ĝemoj kaj mia trinkaĵo la salaj larmoj! Mi eltiras miajn harojn en tufoj, kiam miaj fratoj dancas! Mi plendas kun la ventoj, kiam la aliaj kantas..."

Tiel sonas la doloro de la cigano, kiu priploras familianon. Li konsciiĝis pri la unueco de morto kaj vivo. Ankaŭ la tuta gento estas konscia pri tio. Ili scias, ke ili ne povas eviti la vintron. Tion sentas la popolo, kiu vivas en la fino de sia aŭtuno. Ili sentas tion post la perdo de duonmiliono da fratoj dum la milito; ili sentas, ke la mortado jam komenciĝis. Post cent jaroj la cigana popolo eble estos formortinta. Ĝi estos miksiĝinta kun la rumanoj, hungaroj kaj slavoj. Sed la aliaj popoloj riĉiĝos pro tio, ricevante kelkajn karaktertrajtojn ne malŝatindajn.

La cigano ankoraŭ amas la naturon. Li estas ligita al arboj, herbejoj, montoj kaj fontoj. Lia vivmaniero

kaj lia vivsinteno dependas de la mondo ĉirkaŭ li, en kiu vivo kaj morto estas kiel lumo kaj ombro. Li estas influata de la ĉiam ŝanĝiĝantaj pejzaĝoj, kiujn li travagas. Li kontaktiĝas ĉiam denove kun aliaj homoj. Tiuj influoj formas la ciganon; li noviĝas kaj ŝanĝiĝas daŭre, kaj tio kaŭzas gajnojn kaj perdojn.

La daŭraj ŝanĝiĝoj estas lia fatalo, sed li ne konsciiĝas pri tio. Ili logas lin, ĉar tie naskiĝas lia estonteco. Iradante en la direkto de sia estonteco la cigano travivas tion, kiel "ŝanĝeblan fatalon". Tiel alproksimiĝas la tempo, kiam la ciganaro estos absorbita de la eŭropaj popoloj. Li jam de sufiĉe longe vagadas; malfacila estis lia vojo. La ciganaj gentoj en Eŭropo nepriskribeble suferis pro la eŭropaj popoloj, sed la esenco de la cigano restos, eĉ se li mem estos malaperinta.

La cigano ne estas malgrandanima. Cetere tio ne estas ebla, ĉar la ciganoj formas grupon, kiu daŭre novigas kaj plivastigas sian horizonton Li akceptas la morton, kiam ĝi venas. Same li akceptas sian tempan vivon kiel realaĵon. Li ne ribelas kontraŭ la sorto.

Kun granda respekto la mortinto estas entombigita. Post la morto la korpo estas zorge lavata per sala akvo. Laŭ la ciganoj la salo havas purigan efikon. Post tio oni surmetas la mortovestojn, la plej bonajn, kiujn la cigano havas, kaj poste oni portas la korpon el la tendo eksteren. Oni ne portas ĝin tra la regula elirejo de la tendo, sed oni suprentiras la tendotolon ie ĉe la flanka parto kaj tra tiu malfermaĵo la kadavro estas portata eksteren, ĉar tiam, laŭ la cigana kredo, estas malpli da ŝanco, ke la mortinto revenos. Tiam oni metas la kadavron sur la teron kun la kapo direktita al la okcidento; tio estas pruvo de ilia kosma kompreno, retrovebla cetere ankaŭ ĉe aliaj nomadaj popoloj, kies vivo fluas en intima kunligo kun la naturo.

Ĉe la kapo oni nun batas palison en la teron, kaj sur ĝin oni pendigas la amatajn laborilojn de la mortinto. Post ĉi tiuj preparoj la vera entombiga rito povas komenciĝi. Oni demandas al la mortinto:" Mera tu, kaj baro devla sar kamelas?" Tio signifas: "Ĉu vi vere mortis laŭ la volo de la bona Dio?" Se la kadavro moviĝas post ĉi tiu demando, tiam tio signifas, ke li mortis laŭ nenatura maniero. Tiam la cigano serĉos la kaŭzon, kaj tre ofte la sekvo estas sangovenĝo. Se la korpo restas senmova, tiam povas komenciĝi la funebra tagmanĝo, dum kiu oni trinkas multan alkoholon. Dum ĉi tiu manĝo ĉiu prezentas aŭ kantas ion. Plendkantoj sonadas. Oni devas ne juĝi tion kiel profanecon. Laŭ la cigana saĝeco tiu, kiu estas ebria, diras la veron. La interna vivo perdas tiam sian kaŝemon. Memoru la latinan proverbon:"in vino veritas", en la vino la vero.

En la cigana lingvo la plendkantoj nomiĝas "rovile". Ili estas kantataj, aŭ pli ĝuste parolataj de unu kantanto, kaj poste la aliaj sekvas. La plendkanto konsistas el mallongaj frazoj, esprimantaj la doloron de la funebrantoj. Ĉiam pli rapide aŭdiĝas la kanto kun ĉiam pli mallongaj spirpaŭzoj, ĝis la kantanto, tute elĉerpita, falas teren ĉe la kuŝanta kadavro. Tiam sekvas nova kanto de alia parenco. Tio daŭras dum horoj, eĉ tagoj.


Iom post iom ĉiu funebranto tute elĉerpiĝas; nur tiam oni entombigas la kadavron. Tio ne ĉiam okazas sur la tombejo, sed ofte ĉe la rando de la vojo aŭ en arbaro, tie, kie la mortinto "elflugis el la tendo". En la tombon oni metas ankaŭ kelkajn amatajn objektojn, kiuj antaŭe pendis sur la paliso. Poste oni fermas la tombon per tero kaj oni plantas sur ĝi kreskaĵojn, kiuj portas dornojn. Neniu rajtas difekti tiujn plantojn, alie sekvos morto aŭ akcidento.

Laŭ "Wereldkroniek" - aperinta en "La Praktiko" en 1958.

Paĝo de la geknaboj

Solvo de la enigmoj de la antaŭa numero:

1- Fad-en-O; 2- Viktoro; 3a-Tempo flugas; 3b- ega nubo, eta pluvo; 3c-muroj havas orelojn.

4- 

SALUTOJN EL SAN-FRANCISKO !

Jen bildo de unu el la famaj kablo-tramoj de San Francisko. La tramoj funkcias per ĉiam-ruliĝanta kablo subtera. La tram-ŝoforo - la 'pren-ten-ulo'- en la tramo manipulas longajn stangojn, per kiuj li jen tenas firme la kablon por movi la tramon, jen bremsas la radojn por haltigi ĝin.

La pasaĝeroj ĝuas tre belajn vidaĵojn dum la kablo-tramo veturigas ilin je po 5 mejloj (t.e. po 8 kilometroj) hore, supren-malsupren laŭ la longaj, montetaj stratoj de ĉi tiu gaja, plaĉa haven-urbo ĉe la Pacifika Oceano en Kalifornio, sud-okcidenta ŝtato de Usono.





Jen ankaŭ bildo de mi manĝonta alian specon de kablo-tramo: glaciaĵan specialaĵon de la kafejo "Ghirardelli" (girardeli) en San Francisko. Ĉu vi ŝatus mem frandi " kablo-tramon"? Preparu ĝin jene: sur longa telero formu, per batita kremo, ovalan ringon; en ĝin metu tri grandajn porciojn da glaciaĵo, unu vanilan, unu pistaĉan, unu kafan; surverŝu per hakitaj nuksoj, ĉokolado-flokoj kaj varma acera siropo; aldonu amason da batita kremo, bombonetojn el ĉokolado kaj mento, amandelojn kaj ĉerizojn. Bonan apetiton!

Audrey

P.S. Mi proponas, ke vi invitu geamikojn manĝi la frandaĵon kun vi; eĉ mi ne sukcesis sola manĝi la tuton!

Ĉu vi scias ?

KIO ESTAS "VELKRO"- La vorto "velcro" kiun ni povas, manke de oficiala ekvivalento, esprimi en Esperanto tute nature sub ĝia internacia formo kun laŭfundamenta ortografia ĝustigo "velkro", estas simpla reduktaĵo de du francaj vortoj: "velours" (veluro) kaj "crochet" (kroĉilo). Tiu mirinda materialo, teksaĵo, kies proprajo estas facila kaj firma alkroĉiĝo, fiksiĝo al multspecaj surfacoj, estas eltrovaĵo de svisa meĥanika inĝeniero naskita en 1907, Georgo de Mestral. Fine de la kvardekaj jaroj li metode esploris la rimarkindajn proprajojn de la lapoj, de tiuj strange alkroĉiĝemaj fruktetoj de arktio, kaj dum ĉirkaŭ ok jaroj li klopodis elpensi rimedojn por imiti tiujn proprajojn. Fine, en 1955, dank'al itala firmo, li sukcesis industri-skale produkti kaj lanĉi la unuajn materialojn. Iom post iom li multobligis kaj diversigis la produktadon farante kontraktojn en preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj, en Usono kaj en Japanio. Sub formo de platoj aŭ rubandoj oni uzas tiun materialon por fermi, kunmeti aŭ fiksi plej malsamajn kaj plej neatenditajn objektojn: vestojn, ŝuojn, sakojn aŭ tekojn, veturil-tegaĵojn, eĉ gravajn pecojn.

Laŭ la uzata krudmaterialo, velkro kapablas rezisti je tirfortoj de 700 gramoj ĝis unu aŭ eĉ pluraj kilogramoj por ĉiu kvadrata centimetro En multaj kazoj ĝi avantaĝe anstataŭas kroĉilojn, bultojn, laĉojn,zipojn, gluon, ktp. Ĝi estas jam ege utila en spacoŝipoj, kie ĝi iel korektas la mankon de gravito.

R. GONIN

resume adaptita laŭ artikolo de Judith Stone en "Selection", aperinta en "Esperanto Ligilo".

****

KIO ESTAS ĴTONIGA FONTO- Aŭvernio estas kontrastoriĉa lando, kie, samtempe, fajro kaj akvo kunestas. El la grundo, ŝirita de la vulkanaj erupcioj, elŝprucis lafo kaj bolantaj akvoj. Dume la praa granita bazo, sur kiu konstruiĝis la urbo Clermont-Ferrand, ekfendiĝis sub la premo de nordo kaj sudo. Meze de la fendego formiĝis larĝa kratero, sur kiu hodiaŭ etendiĝas Placo Jaude, kaj ĝiaj elĵetaĵoj estigis la monteton, kie staras la katedralo. Laŭlonge de tiu fendego elfluis multaj mineralaj gasakvoj kun karbonatoj, inter kiuj estas la fontoj Perou de Saint-Alyre.

El la profundejoj de la Aŭvernia tero ekaperis mistero kaj magio. Tiuj fontoj havas tre strangajn ecojn: iliaj akvoj ĵtonigadis ĉion, kion ili surfluis. Pograde dum la jarcentoj formiĝis laŭ la kaprica fluado minerala pejzaĝo de grotoj kaj pontoj ĉirkaŭ ĉiu fonto.

Ekde la 15-a jarcento, kleruloj de foraj regionoj venadis por admiri la fenomenon, ĝin studi kaj priskribi. Sed laŭ popola kredo temis pri iu granda supernaturaĵo signita per la forka piedo de l'diablo kaj ne per la dia fingro. Dum la 19-a jarcento okazis la unuaj provoj de ĵtonigado de modelmuldaĵoj. La labormetodoj iom post iom perfektiĝis kaj naskiĝis de tiu geologia kuriozaĵo unu el la plej belaj regionaj metiartaĵoj.



Diversaj Rakontoj

LA KOKINOJ

- Mi vetas, diras sinjorino Lepik, ke Honora denove forgesis fermi la kokinejon.

Estas vere. Oni povas certigi al si tion rigardante tra la fenestro. Tie, funde de la granda korto, la kokineja kabano montras en la nokto la nigran kvadraton de sia malfermita pordo.

-Felikso, ĉu vi iros fermi ĝin? diras sinjorino Lepik al la plej aĝa el siaj tri infanoj.

-Mi ne estas ĉi tie por okupiĝi pri kokinoj, diras Felikso, knabo pala, malvigla kaj timema.

-Kaj vi, Ernesta?

-Ho, panjo. Mi tro timus!

Frato Felikso kaj fratino Ernesta apenaŭ levas la kapon por respondi. Tre interesataj, ili legas, kun kubutoj sur la tablo, preskaŭ frunton ĉe frunto.

-Dio, kiel mi stultas! diras sinjorino Lepik. Al mi ne venis la ideo. Karotharulo! iru fermi la kokinejon!

Ŝi donis tiun amnomon al sia laste naskita infano, ĉar li havas rufajn harojn kaj lentugan haŭton. Karotharulo, kiu sub la tablo ludas per nenio, ekstaras kaj timeme diras:

-Sed panjo, ankaŭ mi timas!

-Ĉu eble? respondas sinjorino Lepik, granda knabo, kiel vi! Vi ŝercas! Rapidu, mi petas!

-Ni konas lin; li estas maltimema, kiel virkapro, diras lia fratino.

-Nek ion, nek iun li timas, diras Felikso, lia frato.

Ĉi tiuj komplimentoj fierigas Karotharulon, kaj honta, ke li povus montri sin malinda, li jam luktas kontraŭ sia timemaĉo. Por fininstigi lian kuraĝon, lia patrino promesas al li vangofrapon se li ne obeos.

-Almenaŭ lumigu al mi la korton!

Sinjorino Lepik levas la ŝultrojn; Felikso malŝate ridetas. Kompatema, Ernesta prenas kandelon kaj akompanas la frateton ĝis la koridor-fino.

-Mi atendos vin ĉi tie, ŝi diras.

Sed ŝi tuj forkuras, teruriĝinte, ĉar forta ventobato flagrigis la lumon kaj ĝin estingis.

Kun la sidvangoj kvazaŭ kungluitaj kaj kalkanoj enradikiĝintaj, Karotharulo ektremas en la mallumo. Ĝi tiel densas, ke li kredas sin blinda. iafoje, ekblovego lin envolvas kvazaŭ per glacia littuko por lin kunporti. Ĉu vulpoj, eĉ lupoj ne blovas sur liajn fingrojn, sur lian vangon? Plej bone estas sin ĵeti celhazarde al la kokinoj kun la kapo antaŭen por trui la mallumon. Palpante li kaptas la pordkroĉilon. Ĉe la bruo de liaj paŝoj, timigite, la kokinoj klukante agitiĝas sur sia ŝtupetaro. Karotharulo ilin alkrias:

-Silentu do, estas mi!

Li fermas la pordon kaj forkuras per kruroj kaj brakoj kvazaŭ flugilhavaj. Kiam li rehejmeniĝas, anhelante sed fierante pri si mem, en la varmo kaj lumo, ŝajnas al li, ke li interŝanĝas kotonon kaj pluvopezajn ĉifonojn kontraŭ nova malpeza vesto. Li ridetas, rekte staras, orgojle atendas gratulojn, kaj, eldanĝerigita, serĉas sur la vizaĝoj de la gepatroj la spurojn de travivitaj maltrankviloj. Sed frato Felikso kaj fratino Ernesta trankvile daŭrigas sian legadon kaj, per tute natura voĉo, sinjorino Lepik diras al li:

-Karotharulo, vi iros fermi ĝin ĉiuvespere.

Jules Renard

(tradukis jean Lenel)

POR VIA DISTRO


SOLVO DE LA ANTAŬA ENIGMO

Trovotaj vortoj: ĝardenoj - kuirejo-omleto - kantarelo - lojto-makaronio - hirundnesto - mustardo-sukero - oranĝo - ananaso - kurac-istoj - medikamentoj - ricinoleo.

Trovota frazo: unu triono de tio, kion la homoj manĝas nutras la homojn mem kaj du trionoj la kurac-istojn.

NOVA ENIGMO

(proponita de kelkaj esperantistoj el Lille)



Horizontale: 1- Ĝi neniam alvenas sola. 2- adepto de doktrino; evitus ĝin se ili povus (s.f.). 3- en la familio de via kato; ĉiuj kune. 4- montranta inklinon; sen prokraste. 5- eltirita el itala ĉefurbo; simpla vorto; oni aŭdas ĝin antaŭ la koncerto. 6- kunigas la du ekstrem-aĵojn (s.f.); malbenita frukto. 7- matene la suno leviĝas tiele. 8- restigu ion surloke; kuirplanto (s.f.). 8- kiel ovo; sen voĉeco(sf).

Vertikale: 1- krudaĵo. 2- oni diskutas senfine pri ĝia senmaterieco; meze de fromaĝo (s.f.). 3- altiranta; oni povas veturi tiele en le urbo. 4- iru rapidpaŝe. 5- esprimanta seksan volupton. 6- muziknoto; ĝemelaj vokaloj; ŝtoneca tavolo (s.f.). 7- povas esti infanoj aŭ posteuloj; parto. 8- ne demetu ĝin kiam veteraĉas; rilata al Eva. 9- kiel iu flava metalo; senfina verbo; persona pronomo.

LA VIVO EN GRESILLON

Komitatkunveno - Dimanĉon la 2-an de julio 1989

Ceestas la kunvenon: D. kaj P. Babin, F. kaj H. Boyet, B. Cheverry, G. Dairon, G. Lagrange, P. Mĕtivier, J. Vincent. Sendis senkulpigojn: Y. Bodereau, S. Bourot, P. Chevalier, F. Le Magadure, R. Lenel, R. Lloancy.

Staĝoj 1989- Dum junio estis registritaj 277 tranoktadoj por meza nombro da 25 ĉeestantoj., iom malpli ol lastan jaron.

Por la unua staĝo de julio aliĝis 60 personoj. Pro la iom prokrastita alven-dato de S-ro Roose kelkaj ŝanĝoj estas faritaj en la sinsekvo de la prelegoj. Lige al la ĉefa temo, Franca Revolucio, ekskurso estos organizita al lokoj, kie okazis gravaj eventoj antaŭ 200 jaroj. Prelegos entute: F. Boyet, B. Cheverry, A. Frangeul, G. Goudé, G. Lagrange, P. Mĕtivier, H. Röllinger, F. Roose. Gvidos la kursojn: J. Turbillon, D. Keefe, D. Moirand.

por la dua staĝo aliĝis pli ol 60 personoj. Gvidos la kursojn: - 1-a nivelo: Przemek Grzybowski, 2-a nivelo: Joël Laporte, 3-a nivelo Dennis Keefe. Samtempe ĉeestos kaj parte sekvos niajn aranĝojn 25 personoj el La Grupo JEAN.

Por la tria staĝo ne multe da aliĝoj ĝis nun venis, sed ni ricevis multajn inform-petojn. Gvidos la kursojn: Przemek, M.TH. Lloancy, P. Babin. T. Chmielik kaj P. Mĕtivier faros prelegojn pri Edmond Privat.

La kvara staĝo anonciĝas sufiĉe bona. Gvidos la kursojn: Przemek, M.J. Berger, J. Vincent.

Dum la somero administros la staĝojn: L. kaj P. Babin, N. kaj D. Babin, M. Schmidt le Roi, R. Lenel kaj R. Lloancy. En aŭgusto deĵoros L. kaj P. Babin.

Jaro 1990- La Paska periodo okazos de la 10-a ĝis la 21-a de Aprilo. Estas nun malfacile organizi internacian renkonton de infanoj pro la ne-koincido de la datoj de libertempo en la diversaj landoj; paralele al la kursoj por infanoj okazos "Praktika formado de instruantoj kaj instruontoj". La enhavo estos baldaŭ precizigita.

Koncerne la someran kalendaron, la saman dispartigon en po du semajnaj staĝoj konservas la Komitato, kiu bedaŭras, ke la aliĝantaj ofte obeas datojn de ili elektitaj, pli ol tiuj de la staĝoj. La datoj estos la jenaj: 15/06 - 02/07; 02/07 - 16/07; 17/07 - 31/07; 01/08 - 15/08; 16/08 - 31/08. Kiel kutime okazos kursoj, prelegoj kaj semajno pri tradukarto. La komitato ankaŭ projektas la organizon de intensivaj kursoj. Por la administrado de la staĝoj ĝis nun sin proponis: D. kaj N. Babin, L. kaj P. Babin, R. Lenel, R. Lloancy, M. Schmidt le Roi. Espereble, ĉar la okazigo de la staĝoj dependas de la helpo de pliaj geamikoj, novaj "kandidatoj" sin proponos!

La komitato konstatas, ke la refaro de la salono estis bone farita. Dank'al grava anonima donaco estos eble ankaŭ ŝanĝi parton de la meblaro. La prezidanto informas, ke la ĝardenistino rezignis sian postenon la unuan tagon de la somera sezono.

Dominique Babin, nova prezidanto, precizigas, ke la plurfaceta laboro pri Gresillon devas nepre esti dispartigita inter pluraj membroj de la komitato. La prezidanto respondecas pri la realigo de la decidoj de la komitato, sed ne povas mem realigi ĉiujn decidojn. Krom la sekretario kaj la kasisto, kies taskoj estas sufiĉe facile difineblaj, aliaj komitatanoj prenu sur sin parton de la farotaĵoj, kiel jam ekzistas koncerne la Libro-Servon kaj la Informadon. Pli delikata estas la hotel-restoracia flanko de la afero. Ankaŭ pri tiu ni devas trovi solvon. Estas ankaŭ necese havi skipon de staĝ-responduloj kaj aron de instruistoj. La laboro farita de H. Boyet pri la serĉado de gvidantoj de la kulturaj aranĝoj estus tiamaniere simpligita. Gresillon devas ne nur instrui la lingvon, sed ankaŭ partopreni en la formado de la tiel necesaj taŭgaj instruantoj. Ĉiuj komitatanoj devas partopreni en la solvo de la diversaj problemoj.

La prezidanto deklaras la kunsidon fermita je la 16-a horo.

La sekretario: Guy DAIRON

Nia amiko Guy Dairon, informis nin, ke lia patro, Elie, forpasis la 5-an de julio. Elie Dairon estis unu el la unuaj membroj de nia asocio, kaj kvankam li ne estis tre konata de la grezijonanoj li daŭre interesiĝis pri la Esperanto-Domo kaj pri Esperanto. Al Guy kaj liaj familianoj ni sendas niajn elkore amikajn kondolencojn.

LIBRO-SERVO

GRUPESTROJ! Via kaso düonmalplenas...

KURSGVIDANTOJ! vi tamen deziras lernolibron interesan, ne tre multe kostan, por via progresiga kurso.

Jen ĝi estas en nia Libro-servo: "KIEL BRETONO IGIS REGO DE ANGLUJO", de Per-Jakez Helias, en modela traduko de F. Le Magadure, kun belaj ilustraĵoj.

KAJ GI KOSTAS NUR...15 F.

Donacu ĝin al viaj genepoj okaze de nom- aŭ naskiĝ-tago, al via urba junuldomo aŭ lerneja biblioteko.

Speciala rabato ekde 5-ekzemplera mendo.

PETU LA KATALOGON de la Libro-servo.

Denove kelkaj BROKANTAJOJ estas haveblaj. Petu la specialan katalogon.

ADRESO: S-ino J. VINCENT, 26 bis, rue de Milngavie, 49150 BAUGE
Telefono: 41 89 29 47.

NIA KONKURSO

La partoprenantoj devos sendi siajn solvojn antaŭ la 15-a de novembro. El inter la ĝustaj respondoj estos lotitaj la jenajn premiojn :

200 frankoj por aĉetado de libroj ĉe nia Libro-Servo.

150 frankoj por aĉetado de libroj ĉe nia Libro-Servo.

100 frankoj por aĉetado de libroj ĉe nia Libro-Servo.

50 frankoj por aĉetado de libroj ĉe nia Libro-Servo.

UNUA ENIGMO

La solvo konsistas el 84 literoj, kiuj estas numeritaj. La literoj estas troveblaj per la sekvanta ŝlosilvortoj :

9-2-47-48-3-45-44-21 : bruna dolĉaĵo.

40-6-51-20-14-15-4-30-82-83 : artika malsano.

18-49-47-26-24-7-41-11-8-63 : scienco pri malnovaĵoj.

5-12-13-29-19-17-62-63-52-81 : bonfaremulo.

38-40-16-75-76-33-34-35-2 : nigra birdo.

80-58-57-56-55-50-49-23-21 : lanca hakilo.

68-79-31-27-28-36-22-66-10-1-24 : vorto kun « o ».

54-25-42-77-53-15-74 : ofendi per parolo.

60-59-46-69-67-62-41-84-72 : sin laŭdadi.

65-64-78-73-32-30-70 : daŭre.

39-71-43-11-37-19-17-61 : belmaniere.

1-84 : pripensinda opinio de anonima filozofo.

DUA ENIGMO

El la subaj 48 silaboj formu 24 dusilabajn vortojn kun la sekvantaj signifoj :

1) Estinta. — 2) Ĉieldirekto. — 3) Trinkilo. — 4) Akva kreskaĵeto. — 5) Purigilo. — 6) Fianĉina riĉaĵo. — 7) Larĝkorna norda cervo. — 8) Senvesta. — 9) Dromedara korpoparto. — 10) Neprilaborita metalo. — 11) Koloro. — 12) Mitologia koboldo. — 13) Libervola malliberulo. — 14) Flua parto de la frukto. — 15) Antikva vira vesto. — 16) Fluidaĵo por skribo. — 17) Kunveno por dancado. — 18) Knabo sen gepatroj. — 19) Filo de la frato. — 20) Malalta virina voĉo. — 21) Granda sturgo. — 22) Mineralo uzata kiel farbo. — 23) Ĉiopova objekto. — 24) Bordero de tuko aŭ vesto.

La komencaj literoj de la 24 vortoj formas frazon, kiun diris la angla verkisto G.B. Shaw, aŭdinte, ke la hinda gvidanto Gandhi fariĝis viktimo de murdatenco.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (7,50 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (87 kronoj).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (65 mk.).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10ᵉ-D 03003 ALICANTE - (1 400 peset).

Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (15 us. dol.).

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (190.000 lir.).

Japanio : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2700 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (15 U.S. dol.).

Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (25 fl.).

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (15 us. dol.).

Portugalio : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joâo Conto, 6, R/CA. 1500 Lisboâ.

Svedujo : Sveda Esperanto-Federacio Brunnsgatan 21, S. 11138 Stockholm poŝtkonto : 20123 (70 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (20 frs).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F - 49150 BAUGÉ. — Tél. 41-89-10-34

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — Nº C.C.P.P. 36.258 Le Gérant : P. BABIN